

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nroj 5+6/1982 ★ 6,50



Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★
Telefon: 08 - 11 74 34 ★
EsperantoCentro är öppet måndag
torsdag kl. 17 — 19 ★ **Postgiro:**
12-3, Esperantoförbundet ★
Medlemsavgift: direktansluten
medlem 50 kr, ungdomsmedlem
under 26 år 25 kr, familjemedlem
(utan tidning) 15 kr ★
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften ★
Medlemmar under 30 år får
gratis utom ungdomsförbundet SEJUs
blad ktp.

La Espero

Tidskrift för Svenska
Esperantoförbundet ★ **Adress:**
EsperantoCentro, Brunnsgatan 21,
111 38 Stockholm ★ **Ansvarig
utgivare:** Bertil Åkerberg ★
Redaktör: Franko Luin,
Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
Telefon hem 08-712 82 91 ★
Prenumeration: 50 kr per år,
postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet ★ Tidningen
kommer med åtta nummer per år
★ **Fotosats och tryck:**
EsperantoCentro, Stockholm 1982

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö
Besöksadress: Möllevångsgatan
10 B ★ **Öppettider:** 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17
— 18 ★ Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även under
somnaren ★ **Telefon:** 040-12 20 29
★ **Postgiro:** 578-5 ★ **Expedition:**
Vivi Nilsson ★ **Styrelsens
ordförande:** Anita Lindblom

HODIAŬ

Ĉu unue malavantaĝoj por atingi avantaĝojn?

En longa artikolo en ĉi tiu numero de *La Espero* Ouyang Wendao, ĉina sciencisto, klarigas kaj pravigas al siaj ĉinaj gekolegoj kaj politikistoj la avantaĝojn, kiujn la ĉinoj havus per enkonduko de esperanto kiel interlingvo, do per akcepto de esperanto en la rolo por kiu ĝi estis farita.

Oni ne povas nomi la ĉinan malgranda lingvo, sed kiam temas pri internacia interŝanĝo de ideoj kaj informoj, ĝi apenaŭ ludas pli gravan rolon ol la sveda. Kiuj lingvoj povas esti nomataj "grandaj" estas demando de difinoj; plej ofte oni ne inkluzivas neeŭropajn lingvojn al ili, malgraŭ la evidenta riĉega kultura fono, sur kiu tiuj lingvoj baziĝas kaj malgraŭ tio, ke la plejparto de la homaro fakte parolas neeŭropajn lingvojn (apud la ĉina ankaŭ la hindan, araban, japanan, bengalan).

"Grandaj" fariĝis la lingvoj, kiuj en la internacia komunikado akceptigis la rolon de si kiel perantoj de tiu komunikado: do la franca, la angla, ĝis ia grado la rusa. Punkto. Fino. Ke la angla pli kaj pli elstaras inter ili, ne estas ia sekreto. Sciencistoj, politikistoj, sindikatoj, simplaj homoj, estas vole-nevole devigataj esprimi sin en unu el tiuj lingvoj, kun la rezultoj kiujn ni konas. Kaj ne estas tre verŝajne, ke la situacio multe ŝanĝiĝos dum la venontaj jaroj.

Paroli propran lingvon en internaciaj forumoj kaj en la artefarita ĉiutago, kiun la turismo reprezentas, estas privilegio, kiun neniu nacio libervole rezignos. Rimarkebla estas la batalado de la franca kontraŭ la superrego de la angla — ne favore al aliaj malgrandaj lingvoj, sed nur favore al si mem.

Proponi en tia situacio esperanton, kiel oni kelkfoje faras en Eŭropa Komunumo, tre malfacile kondukos al akcepto. Oni devos unue krei situacion, kie

esperanto elstaru kiel pli facila kaj pli justa solvo por ĉiuj nacioj. Oni je nomo de justeco al ĉiuj partoprenantoj de diskutoj en internaciaj forumoj, ĉu politikaj ĉu kulturaj ĉu sciencaj aŭ ekonomiaj, malpermesu sin esprimi en sia propra lingvo. Oni devigu ĉiujn francparolantojn elekti alian lingvon ol sian propran, kaj estu egale ĉu tiu lingvo estu la angla, la islanda aŭ la araba; oni same devigu ĉiujn anglaparolantojn paroli ion ajn alian ol la anglan. Sufiĉus fakte limigi sin al tiuj, kiuj kvazaŭ profesie konferencas kaj kongresas. Eĉ donante al ili ĉiun eblan teknikan helpon (tradukistoj kaj tradukmaŝinoj) ili baldaŭ devos rimarki, kion maleblo esprimi sin en sia propra lingvo signifas. Estas unu afero aŭskulti iom indulge balbutantan islandanon (pardonon — estas nur ekzemplo!), kaj afero tute alia esti tiu balbutanto.

Akcepto de tia solvo de internacia komunikado ne kreus kaoson. Ekzistas sufiĉe da lingve edukitaj homoj, kiuj tute bone povus daŭrigi funkciigi la maŝinaron. Sed la sistemo kreus komprenon ĉe la parolantoj de la "grandaj" lingvoj pri la stato de maljusteco ĉe ĉiuj neparolantoj de tiuj lingvoj. Ĉar ĝuste malkompreno de tiu stato (aŭ eble ja kompreno, sed malemo mem eniri en ĝin, lasante sian privilegian pozicion) estas malantaŭ la neglektado de la solvo, kiun esperanto proponas.

Propono pri malpermeso de sinesprimado en propra lingvo certe ne venos de la landoj, kies lingvoj estas "grandaj", kaj estos certe tre granda kontraŭstaro al tia decido. Sed kial? Oni ne bezonus ŝanĝi, ekzemple, la strukturojn de UN pro tio; la nunaj oficialaj lingvoj povus daŭre resti oficialaj; oni povus en ĉiuj aliaj forumoj daŭrigi kiel

(al p. 75)

ISSN 0014-0694
NOVEMBRO 1982
70-A JARKOLEKTO
FONDITA EN 1913

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

INNEHÅLL/ENHAVO

58/Ĉu unue malavantaĝoj
por atingi avantaĝojn?
59/Upptaktsträff för FNs
internationella år för
kommunikation
60/Instruistoj somere
ĉe la golfo de Napoli
61/TEMO: Ĉina sciencisto
pri la rolo de esperanto
64/Virinoj kaj ilia
rolo en Suda Ameriko
67/Unu el la plej gravaj
dum la lastaj jardekoj
70/Årets nya böcker
76/Esperantonytt



UPPTAKTSTRÄFF FÖR

FNS INTERNATIONELLA ÅR FÖR KOMMUNIKATION 1983

Språket. Människans viktigaste kommunikationsmedel.

Lördag 29 jan 1983 kl 14-17

Karlbergsvägen 32, Föreningshuset
(T Odenplan, uppgång Västmannagatan)

Inledningar av:

Erik Ransemar, författare:

Kommunikation sett ur konstnärlig skapande synpunkt

Ake Sandin, ordf i Svenska Freds 1977-79, lärare:

Fred, u-land, språk

Christer Kiselman, professor:

Vad är ett världsspråk

Ingemar Nordin, rektor:

Esperanto och skolan

Utställning, bokbord och kaffeservering

Arr.: Esperantoförbundet tillsammans med lokala
esperantoföreningarna

Anmälan senast 20 jan till

Esperantoförbundet, Brunnsgränd 21, 111 38 Stockholm

tel 08-11 74 34 (må-to 17-19, 18 10-12)

Instruistoj somere ĉe la golfo de Napoli

La 16-a internacia konferenco de ILEI okazis ĉijare en Seiano, Italio, inter la 19a kaj 24a de julio. Seiano situas ĉe la mirinde bela golfo de Napoli, proksime al la majesta vulkano Vesuvio.

Partoprenis delegitoj el dek landoj, inte alie Svedio. La ĉefa temo de la konferenco estis *La emancipa principo de esperanto: eblecoj kaj limoj*.

La solena inaŭguro okazis en la kastelo de Vico Equense, kie reprezentantoj de la ministerio pri publika instruado, de la komunumo kaj de UEA salutparolis.

La programo estis enhavoriĉa kaj konsistis el prelegoj, kunvenoj, diskutoj, distraĵoj, ekskursoj kaj amika kunestado. La plej grava punkto de la programo estis la asembleo, kiu okazas ĉiun

trian jaron. La asembleo elektis estraron por la venonta laborperiodo. Kiel prezidanto estis reelektita Helmut Sonnabend, FR Germanio, sekretario Mario Dazzini, Italio, vicsekretario Francisco Zaragoza Ruiz, Hispanio, vicprezidanto Anica Hurĉak, Jugoslavio, kasisto Bertil Andreasson, Svedio. La lastaj du estas novaj en la estraro, Bertil post Olle Olsson, kiu retiriĝis.

La asembleo ankaŭ aprobis rezolucion, en kiu oni konstatas, ke homoj, kies lingvoj ne apartenas al la "grandaj", ekzemple la angla, franca, rusa aŭ germana, nepre devas lerni unu aŭ du el la nomitaj lingvoj. Oni ankaŭ konstatis, ke anoj de la kvar lingvoj estas favorigataj pli facile partopreni internaciajn renkontiĝojn kaj ĝui sociajn avantaĝojn.

Estas risiko, ke la malgrandaj lingvoj kaj kulturoj pro neglekto reduktiĝas al absoluta sensignigo de lingvaj minoritatoj.

Pro tio oni rekomendas vastan esperanto-uzadon en ŝtatoj, kies lingvoj ne estas instruataj kiel fremdaj. Oni ankaŭ rekomendas, ke oni komencu instrui esperanton antaŭ ol oni ekinstruas aliajn fremdajn lingvojn. Pere de Unesko oni volas disvolvi esperanto-instruadon en ĉiuj ŝtatoj kaj tiel restarigi samajn lingvajjn ŝancojn.

La asembleo ankaŭ decidis, ke ĉiuj landaj sekcioj voĉdonos pri la nova statuto de ILEI, en skriba formo, por certigi demokratian decidon.

Interesaj prelegoj pri diversaj temoj interrompis la pedagogiajn diskutojn. Hugo Rölliger, FR Germanio, prelegis pri *Originoj de Eŭropo. Orientaj aspektoj de la Okcidento*. Mirko Mercetta, Italio, prezentis sian ideon pri *Unu lingvo, unu fonetika skribo*, laŭ kiu oni per difinitaj signoj povas ankaŭ desegni ĉiun sonon kaj adapti ĝin al ĉiuj fonetikaj sistemoj ekzistantaj. Nicolino Rossi, Italio, prelegis pri *Kelkaĵ konsideroj pri la avangarda literaturo de esperanto*.

La malpli serioza parto de la konferenco konsistis el, inter alie, tre interesaj ekskursoj al la antikvaj urboj Pompei kaj Ercolano, kiuj estis detruitaj en la jaro 79 de vulkana erupcio de Vesuvio kaj nun arĥeologie elfositaj. Alian tagon oni ekskursis al la urbo Torre del Grecco, kie la partoprenantoj vizitis fabrikanon, kie oni el koraloj kaj konkoj faras kameojn kaj kolĉenojn.

La kongresanoj ankaŭ faris ekskurson al la insulo Capri. Unu tagon oni vojaĝis al la urbeto Pollena Trocchia, kie okazis akcepto fare de la urbestro kaj inaŭguro de esperanto-strato. Ĉe la bela strato oni nun konstruas novan urbodomon.

En antaŭa numero de *La Espero* profesoro Istvan Szerdahelyi en intervjuo diris, ke estas necese kaj dezirinde, ke svedaj instruistoj kaj kursgvidantoj partoprenu la internaciajn konferencojn de ILEI. Tial aliĝu al konferenco en 1983, kiu okazos inter la 14a kaj 22a de julio en Sintra, Portugalio. Aliĝiloj kaj provizora programo estas haveblaj ĉe Bertil Andreasson, Södra Rörum, 24200 Hörby

1983-års stad är Budapest!

Nästa års internationella esperantokongress kommer att äga rum i Budapest i Ungern. Det är klart att du ska vara med! Gör slag i saken redan i år — det tjänar du på! Den 1 januari går avgifterna upp med minst 10%.

Beräkna din avgift enligt följande tabell:

| | |
|-------------------------------------|--------|
| 1 Icke medlem i UEA | 510 kr |
| 2 Medlem med årsbok | 440 kr |
| 3 Medlem med årsbok och 'esperanto' | 340 kr |
| 4 Make/maka till 1. | 360 kr |
| 5 Make/maka till 2 eller 3 | 310 kr |
| 6 Ungdom t.o m 20 år | 155 kr |
| 7 Heltidsstuderande t o m 30 år | 255 kr |
| 8 Synskadad | 205 kr |

Beställ anmälningsblankett från Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09. Blanketten ska tillbaka till samma adress, ifylld.

Du betalar till postgiro 14 74 29-5. Esperantoförbundet. Specialkonto

Ĉina sciencisto pri la rolo de esperanto

Lingvaj baroj malhelpas scian interesanĝon

Inter diversaj landoj iras tre vastaj sciencaj kaj kulturaj interesanĝoj, kiuj koncernas disvolviĝon kaj progresadon de modernaj scienco kaj tekniko. La homoj tamen ankoraŭ parolas multajn lingvojn kaj skribas diversajn literojn. Tial, ju pli multe disvolviĝas la scienco kaj tekniko, kaj ju pli oftas la kultura interesanĝo, des pli netolerebla fariĝas la problemo de lingvaj baroj.

Laŭ takso, en la tuta mondo estas 2 500 — 3 000 naciaj lingvoj, el kiuj dek unu estas multe uzataj; ili estas la hana [kion ni okcidentanoj nomas la ĉina, red. rim.], la angla, la hindia, la rusa, la hispana, la franca, la portugala, la araba, la indonezia, la japana kaj la germana.

Por kolektado de sciencaj literaturoj, ekzemple en iu inform-instituto, oni devas pritrakti materialojn en 60 lingvoj de pli ol 100 landoj, kio ankoraŭ ne inkluzivas agrikulturon kaj aliajn fakojn. Krome, ĉiujare estiĝas ĉirkaŭ 10 milionoj da patentoj, kiuj estas skribitaj de la inventintoj en sia gepatra lingvo. La sciencaj gazetoj estas publikigataj preskaŭ nur en nacia lingvo. Plie, la sciencaj publikaĵoj de disvolviĝantaj landoj, inkluzive tiujn de Ĉinio, okupas pli kaj pli gravan lokon. Oni povas facile vidi, ke konsiderinda kvanto da verkoj ne povus esti ĝustatempe utiligita, se sciencistoj kaj teknikistoj scipovus nur unu aŭ du fremdajn lingvojn. Tio certe estas granda perdo por la interfluo kaj disvolvo de sciencoj en la mondo. Multaj landoj estis devigataj starigi specialajn instituciojn por traduki kaj eldoni sciencajn informojn kaj resumojn; por tio oni elspezas multajn homfortojn kaj materialojn. Tamen eĉ tiel oni ankoraŭ ne povas helpi la transpaŝon de lingvaj baroj.

Krome, okazas ĉiujare en la

mondo centoj da sciencaj konferencoj kaj fakaj simpozioj kaj kunsidoj, kiuj donas bonajn ŝancojn por ĝustatempe koni novajn sciencajn atingojn kaj interesanĝi sciencajn opiniojn. Tamen, la lingvaj baroj multe reduktis la rikoltojn akirendajn de tiuj aktivadoj.

Aperas fakte en la scienco multaj problemoj, kiuj povus esti



Ne nur en Eŭropo oni diskutas pri la avantaĝoj de esperanto. Sur la venontaj paĝoj ni publikigas tradukon de prelego de ĉina sciencisto, kiu temas pri esperanto kaj la rolo kiun ĝi ludu en Ĉinio - kaj analizo de la avantaĝoj, kiujn la ĉinoj havus uzante esperanton. Vi trovos, ke la argumentoj tre similas al la "eŭropaj" argumentoj, sed ne tute.



Esperanto provizas veran solvon de multlingva problemo

Kia internacia lingvo estas necesa?

Por racia solvo de multlingva problemo, laŭ mi la ideala rimedo estas uzi internacian lingvon, t e serĉi unu komunan lingvon, kiu dependas de neniu lando kaj neniu nacio, sed estas akceptebla por plejmulto da landoj kaj iliaj popoloj. Tiu ĉi internacia lingvo devas esti ne nur simpla kaj facile lernebla, sed ankaŭ sufiĉe klara, logika, taŭga kaj esprimriĉa, kaj kapabla elvolvi el la principo de internacieco kaj fundamenteco, samtempe kapabla ĉerpi nutraĵon el diversaj nacilingvoj.

Esperanto — ĝuste tia internacia lingvo

kia lingvo povas servi kiel tia internacia lingvo? Laŭ mia opinio, nuntempe nur esperanto estas la plej taŭga kaj kompetenta por tiu celo. Post kiam Zamenhof publikigis esperanton, la lingvo travivis pli ol 90 jarojn en provado kaj praktika uzado, kaj ĝi estas rekonata de la tuta mondo kiel vivplena internacia lingvo. Ĉar ĝi estas neŭtrala inter la naciaj lingvoj, ĝi kaŭzas nenian lingvan diskriminacion inter la nacioj. Ĝi estas facile komprenebla kaj havas karakterojn de logikeco kaj esprimriĉo. Ĝia

TEMO



vasta populareco montriĝas en tio, ke en diversaj landoj oni libere ĝin uzas, kaj troviĝas organizoj internaciaj kaj landaj por ĝin propagandi kaj disvastigi. Ĉiuj, kiuj ne havas antaŭjuĝon kontraŭ esperanto kaj ne persistas en lingva hegemonio de la potencaj landoj povas vidi, ke disvastigo de esperanto en la tuta mondo, precipe en sciencaj rondoj, alportos utilon al la homaro. Fakte, jam parto de sciencistoj kaj teknikistoj publikigis siajn esplorajn fruktojn en esperanto, kaj faris teknikajn interŝanĝojn per ĝi kaj akiris certajn sukcesojn.

La jam menciita dua internacia konferenco pri lingvoproblemo en scienco montris en sia decido, ke la sciencistoj ĉeestintaj la konferencan kredis, ke esperanto provizas veran solvon por lingva problemo en scienco.

La fama soveta geografo D.L. Armand en sia verko "Homaro kaj oceano de informado" (*Sciencia revuo*, nro 4, 1977) opiniis, ke esperanto estos enkondukita en la sciencaj rondoj en jenaj du ŝtupoj: unuaŝtupo estos, en la kampo de scienca informado, enkondukitaj devigaj resumoj en la komuna lingvo, aŭ tradukataj mallongigaĵoj de la tekstoj. Dum dua ŝtupo oni presigos sciencajn literaturon paralele en la nacia kaj internacia lingvoj.

Sendube, esperanto certe faros grandan kontribuon en solvo

de la lingvaj baroj en scienca interŝanĝo kaj en akcelo al la disvolviĝo de scienco kaj kulturo de diversaj landoj. Ni povas anticipi, ke esperanto certe fariĝos internacia komuna lingvo en sciencaj kampoj.

Kial nacia lingvo ne povas anstataŭi internacian lingvon

Eble iuj ankoraŭ demandas, kial oni per internacia interkonsento ne prenas iun nacian lingvon kiel komunan lingvon en scienco. Tie kuŝas kaŭzoj multflankaj. Unue: se la lingvo de iu nacio estus akceptita kiel internacia komuna lingvo, tiam tiu ĉi nacio estus en privilegia pozicio. Ĝi povus ŝpari cent mil milionojn da laboragoj en fremdlingva lernado kaj pli facile antaŭirigus sciencojn kaj teknikojn. Sekve ĝi havus la eblecon de ekspansio en ekonomio kaj politiko, almenaŭ ĝi povus havigi al si ekonomian kaj politikan interesojn. Tial aliaj nacioj absolute ne konsentus doni al ĝi ĉi tiun privilegion. Krome: en la internacia sfero la naciisma batalado por sendependeco kaj liberigo estas ĉiam intime ligita kun la batalado kontraŭ lingva hegemonio kaj lingva diskriminacio. Tial la disvastigo de la internacia lingvo esperanto estas ne nur la vojo de racia solvo de multlingva problemo, sed ankaŭ la sola reala vojo.

Nia lando bezonas sanan lingvan politikon kaj reformon de fremdlingva instruado

Lingvaj ŝarĝoj sur niaj ŝultroj

Por ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj la lingva malfacilo en sciencaj interŝanĝoj estas des pli granda, pro diferenco inter la ĉina lingvo kaj la okcidentaj. La ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj elspezas en sia tuta vivo konsiderindan tempon en fremdlingva lernado. Generale ili lernis 5—6 jarojn en mezlernejo kaj 1—2 jarojn en universitatoj, kaj krome, oni ankoraŭ devas daŭrigi la lernadon en siaj profesiaj postenoj. Malgraŭ tio nur eta parto el ili bone posedas iun aŭ alian fremdan lingvon. Des pli malmultaj

estas tiuj, kiuj kapablas libere interparoli kun fremdlandanoj. Tiu ĉi situacio estas tre malfavora al nia lando por efektiviĝo de modernaj konstruadoj.

Imagu, kiom niaj junaj lernantoj jam estis ŝarĝitaj per lernado de la gepatra lingvo! Kaj kiel malfacile estas por ili lernadi fremdlingvojn sub enlandaj kondiĉoj! Kalkulu ilian elspezon de tempo kaj energio, kaj ĝin komparu kun la okcidentaj lernantoj! Kiel ni povas ebligi al nia juna generacio marŝi pli rapide antaŭen en la sfero de scienco kaj kulturo? Tio ne estas bagatela.

Pro tio ni bezonas sanan lingvan politikon kaj reformon de fremdlingva instruado.

Kian lecionon historio donis al ni?

Estas utile, ke ni retrorigardu la historian sperton depost la liberigo. De la komenco de la 1950aj jaroj ĝis la komenco de la 1960aj jaroj en nia lingva politiko okazis du turniĝoj. La unua turniĝo estis de la angla al la rusa; tio okazis tuj post la liberigo, kaj tio furoris en la 50aj jaroj. Kaj la dua turniĝo estis de la rusa returne al la angla ekde la 60aj jaroj. Ni ĉiuj scias, kian grandan perdon alportis al ni tiuj ĉi du abruptaj turniĝoj. La historia sperto instruis al ni ĉiuj, ke sana lingva politiko estas nepre bezonata por la progreso de nia lando.

Tiel grava estas la lingva politiko, ke en iuj landoj eĉ estas starigitaj specialaj institucioj por esplori kaj formuli sian propran lingvan politikon. Tio postulas certe profundan komprenon de populareco kaj internacieco de la scienco, kaj de kontinueco kaj nedisigebleco de la kultura progreso de la homaro. Aliflanke, oni ne rajtas ignori la fakton, ke por lerni fremdajn lingvojn oni devas pagi altan koston. La afero estas evidenta, se ni rigardus, ekzemple, la anglan kiel komunan lingvon en sciencaj kampoj: la ĉinaj sciencistoj estus ĉiam devigataj elspezi kelkajn jarojn por ellerni tiun lingvon, anstataŭ utiligi tiun tempon por sciencaj esploradoj kaj teknikaj inventadoj, kiel faras la sciencistoj en Usono kaj Britio. Tiam ni neniam povos liberigi nin el la malfavora situacio kaj kuratingi la progresajn landojn en sciencaj sferoj, kvankam ni ĉinoj estas same kapablaj kaj saĝaj kiel aliaj popoloj. Do, kiam ni kuraĝigas lernadon de fremdlingvoj, ni nepre atendas tiun ĉi neekvilibrantan situacion. El tio oni certe povas vidi, ke nia aktiva disvastigo de esperanto kiel internacia lingvo precipe en sciencaj kampoj havas pli profundan signifon, kaj tio koincidas kun la longtempa intereso de nia lando.

Ponto por ĉinoj en lernado de fremdaj lingvoj

Esperanto ne nur povas servi kiel internacia komuna lingvo, sed ankaŭ havas specialan funkcion

en fremdlingva instruado.

Nia estimata kamarado Wu Yuzhang iam diris: "Esperanto ludas rolon en interkomunikado de la ĉina kaj aliaj lingvoj. La lingvoj de la eŭropaj landoj estas relative parencaj, dum la ĉina lingvo havas tre malmultajn rilatojn kun tiuj lingvoj. Tial estas malfacile por ĉinoj lerni fremdlingvojn. Esperanto estas facile lernebla. Post mallonga lernado oni povas ĝin uzi, tial ĝi povas servi kiel ponto por ĉinoj en lernado de fremdaj lingvoj."

Luj taksis: la necesa tempo por posedi esperanton en legado, aŭskultado, parolado kaj verkado estas nur kvarono de tiu por ellerni alian fremdlingvon. Se oni jam posedas unu fremdlingvon (okcidentan) kaj poste esperanton, oni eble bezonas nur la okonon aŭ eĉ dekonon de la tempo por ellerni alian fremdlingvon. Kontraŭe, se oni unue lernus esperanton kaj poste aliajn fremdlingvojn, la efiko ege plialtiĝus.

Kial esperanto povas servi kiel ponto en fremdlingva lernado?

1. La radikaro de esperanto ne estis kreita senbaze kaj ĝi sorbis la elementajn kaj komunajn radikojn de hindeŭropaj naci-lingvoj.
2. Esperanto estas tre regula kaj en prononco kaj en gramatiko. Ĝiaj reguloj estas koncizaj kaj ekskluzivaj je malnormalaj kaj superflujaj fenomenoj.
3. Esperanto riĉiĝis sin en la

longtempa uzado de la popoloj de diversaj landoj en iliaj produktivaj kaj kulturaj praktikoj, sekve ĝi jam fariĝis vivplena lingvo.

Krome, esperanto estas relative proksima al la ĉina lingvo (ekzemple, la vortfarado de esperanto estas tre proksima al tiu de la ĉina lingvo). Tial lerni unue esperanton kaj poste lerni aliajn fremdlingvojn estas la plej mallonga vojo por la ĉinoj, kiuj volas rapidigi sian lernadon de fremdaj lingvoj.

Eksperimento en la mezlernejo de Somero (Finnlando) temis pri du paralelaj klasoj, en kiuj en unu la lernantoj lernis esperanton unu jaron kaj poste lernis la germanan du jarojn, dum la lernantoj de alia klaso lernis la germanan tri jarojn. Rezulte, la unua klaso ne nur posedis la germanan pli bone ol la dua klaso, sed ankaŭ povis korespondi kun fremdlandaj studentoj per esperanto, kvankam la du klasoj havis la saman germanlingvan instruiston. Rimarkinde estas ankaŭ, ke tiuj lernantoj de Somero origine sciis nur la finnan lingvon, kiu tre malsimilas al la aliaj eŭropaj lingvoj.

Ni povas do projekti reforman eksperimenton laŭ la ekzemplo de Somero. Se niaj lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj lernus unue esperanton unu jaron kaj poste aliajn fremdlingvojn, ili certe profitus pro bonorda maniero kaj laŭstupa progreso; la efiko de la instruado certe altiĝus.

Maŝintradukado de scienca literaturo kaj ideala inter-lingvo

Disvastigo de esperanto estas la fundamenta elirvojo por transpaŝi lingvajn barojn en scienco; krome maŝina tradukado ankoraŭ estas promesoplana helpa rimedo. La esplorado de maŝintradukado per komputoro havas historion 30-jaran. Ĝi estas multe pli kompleksa scienca laboro ol oni imagis. Fakte, ĝi koncernas la esploron de tiel nomata "artefarita intelekto". Mi ne volas diskuti la tutan aferon de maŝina tradukado, sed nur iom paroli pri la problemo de "inter-lingvo" kaj la rolo de esperanto sur tiu flanko.

Kio estas "inter-lingvo"?

Ni klarigu tion per ekzemplo. Se oni prenas esperanton kiel interlingvon, tiam, kiam iu volus traduki tekston el la ĉina en aliajn lingvojn, sufiĉus por li nur traduki el la ĉina lingvo en esperanton. Aliaj transformus la esperantan tekston en aliajn lingvojn. Sammaniere alilingvaj tekstoj povas esti tradukataj en la ĉinan lingvon tra esperanto. La ideo de "inter-lingvo" estas sendube racia supozo. Ĉar pere de inter-lingvo nur unu lingvo (esperanto) jam sufiĉas por la tradukado kaj el la ĉina lingvo kaj

el aliaj lingvoj. Tio ne nur ebligas ĝustatempan tradukon de grandaj kvantoj da scienca literaturo, sed povas ankaŭ ŝpari multan homan forton kaj materialan provizon.

La avantaĝoj de inter-lingvo ankaŭ kuŝas en tio, ke pere de ĝi la nombro de regularoj pri maŝintradukado eble ege malpliĝas. Komparu la jenajn malsamajn procedojn: Se oni prenas senperan tradukan sistemon sen inter-lingvo, oni bezonas konstrui po du analizaj kaj sintezaj regularoj por ĉiu paro de intertradukataj lingvoj. Ju pli multaj estas la partoprenantaj lingvoj, des pli multaj estas la regularoj, kies nombro estas kalkulata laŭ

"Disvastigo de esperanto estas la fundamenta elirvojo por transpaŝi lingvajn barojn en scienco"

la formulo $N(N-1)$. Ekzemple: se 10 lingvoj partoprenus en la tradukado, la nombro de regularoj estus 10×9 , tio estas 90. Tamen, se oni prenas esperanton kiel inter-lingvon, estas sufiĉe konstrui nur po unu analizan kaj unu sintezan sistemon por ĉiu lingvo. Do la nombro de regularoj kalkuliĝas laŭ la formulo $2N$. Ekzemple: se 10 lingvoj partoprenus en tradukado, la nombro de regularoj estus nur 2×10 , tio estas 20.

Luj provis krei tute novan simbolan sistemon por ke ĝi eble ludu la rolon de inter-lingvo. Tamen, tiu ideo ŝajne ne estis reala; ĉar la lingvoj de la homaro estas tiel riĉaj, kaj eĉ povas esti esprimataj per aliaj simboloj. Laŭ mia opinio, estas neniu alia lingvo pli taŭga ol esperanto por ludi la rolon de inter-lingvo en tradukado de naturaj lingvoj. Luj kredis, ke iu ajn nacilingvo (ekzemple la angla) povus ludi la rolon de inter-lingvo, kondiĉe ke oni ĝin simpligus kaj normigus. Tamen, oni ne povas nei, ke esperanto mem ja estas norma

artefarita lingvo kaj povas kontentigi la bezonon de maŝintradukado pli facile ol iu ajn naci-lingvo.

Kompreneble, la realigo de tiu ideo por konstrui maŝintradukan sistemon kun esperanto kiel inter-lingvo dependas de kunlaboro de diverslandaj sciencistoj kaj esperantistoj, kiuj povas esplori tradukadon inter sia gepatra lingvo kaj esperanto. Do ni ĉinoj povas prilabori tradukon inter esperanto kaj nia propra ĉina lingvo.

Konkludo

El la supra diskutado oni vidas, ke la vojo por venki lingvajn barojn estas trovita. Ni emfazas, ke esperanto estas la sola internacia lingvo, kiu povas solvi la lingvajn problemojn en scienco; do ĝia disvastigo certe helpas instigi sciencajn kaj kulturajn interŝanĝojn inter diversaj landoj. Ĝi

"Esperanto estas la sola internacia lingvo, kiu povas solvi la lingvajn problemojn en scienco"

povas funkcii kiel ponto por lerni okcidentajn lingvojn, do ĝi aparte estas taŭga ŝtuparo kaj la plej mallonga vojo de fremdlingva lernado por ni ĉinoj. Disvastigo de esperanto koincidas kun nia nacia intereso kaj estas necesa por nia moderna socialisma konstruado. En la kampo de maŝintradukado ĝi estas plej kompetenta por ludi rolon de inter-lingvo. Cio ĉi montras al ni la brilan perspektivon pri apliko de esperanto en scienco. Kompreneble, ni ankoraŭ devas fari multajn klopodadojn por tio; ni devas fari multajn esploradojn kaj eksperimentojn por tio.

Scienco bezonas esperanton kaj esperanto des pli sciencon.

Ouyang Wendao
Instituto pri aŭtomacio
Ĉina Akademio de Sciencoj

Virinoj kaj ilia rolo en Suda Ameriko

Märtha Andréasson veturis al Brazilo pasintjare kun du celoj: partopreni la Universalan kongreson en Brazilia kaj pristudi la staton de virinoj en Suda Ameriko. Por la dua celo ŝi ricevis eĉ vojaĝstipendion. Ĉisube sekvas parto de ŝia raporto pri la virinoj sudamerikaj.

La materialon por la raporto mi havigis per intervjuoj kaj interparoloj kun diversaj personoj, kaj per notoj dum tiuj kunvenoj kun virinoj el diversaj landoj, kiuj estis aranĝitaj dum la 66a Universala kongreso de esperanto en 1981.

Post la kongreso mi partoprenis vojaĝon tra kelkaj aliaj sudamerikaj landoj, Bolivio, Peruo, Ekvadoro, Kolombio, kaj krome mi restis kelkajn tagojn en Rio de Janeiro.

Priskribi la situacion por la virino en Brazilo estas malfacila tasko, ĉar estas grandega lando kun aro da malsimilaj vivkondiĉoj. La diferencoj inter la diversaj loĝantaraj grupoj ankaŭ estas tre grandaj.

VIRINAJ ORGANIZOJ PRESKAŬ NE EKZISTAS


Ne eblas kontakti virinajn organizojn, ĉar tiaj ne ekzistas. Aŭ pli ĝuste dirite: neniu deca virino apartenas al iu virina organizo. Se ŝi faras, oni konsideras ŝin maldeca, prostituita, lesba.

Generale ŝajnas, ke la virinoj en pli altaj sociaj tavoloj estas relative liberaj kaj ĝuas sufiĉe grandan egalecon kun la viroj. Sed ju pli malsupre sur la socia ŝtuparo la virino troviĝas, des pli subpremata ŝi estas.

Kia estas la situacio por la virinoj en la rondo de la homoj ŝajne tute elpuŝitaj de la socio, mi ne havis eblecon esplori. Iliajn loĝlokojn oni ne vizitas por nura scivolemo. Oni vidas iliajn domaĉojn, budaĉojn en la eksteraĵoj de ĉiuj grandurboj en ĉiuj landoj, kiujn mi vizitis. Multaj el ili estas indianoj, kiuj venis al la urboj kun la espero tie trovi laboron. Estis inter ili ankaŭ multaj nigruloj kaj mikstrasuloj. Ofte ili loĝas sur la altaĵoj, tio estas ja malnova indiana kutimo. Oni adoris la sunon kiel dion, kaj tiam estas noble loĝi kiel eble plej proksime al la suno.

NENIA RASA DISKRIMINACIO

Je mia demando oni respondis, ke ne ekzistas rasa diskriminacio. Sed mi nenie vidis gejunulajn parojn de malsamaj rasoj, ekzemple ĉirkaŭbrakumitaj promenante laŭ la marbordo de Copacabana en Rio aŭ aliloke. Tiaj gejunulaj paroj estis ordinara vidaĵo, sed ili ŝajne ĉiam estis el sama haŭtkoloro. Sed certe ekzistas miksaĵoj kaj en grupoj oni ofte vidis gejunulojn el diversaj haŭtkoloroj kune.



Norda Brazilo kaj la interno de la lando estas la plej malriĉaj partoj kaj tie vivas multaj solaj virinoj kun infanoj, kaj ankaŭ multaj sengepatraj infanoj. Tie ankoraŭ regas la tradicia rigardo al la virino.

Multaj virinoj laboregas kaj endome kaj sur la kampoj, dum la viroj prizorgas la brutaron. Tion rakontas virino el la regiono Goias, 200 — 300 km norde de la ĉefurbo Brazilio.

LA PATROJ OFTE MALAPERAS

El morala vidpunkto ne estas problemoj por needziniĝintaj patrinoj en tiu regiono, ĉar preskaŭ neniu edziniĝas laŭleĝe. Multaj eĉ ne scias, kiam ili naskiĝis.

Sed ekonomie estas ofte grandaj problemoj. Ian helpon de ŝtato aŭ komunumo ili ne ricevas kaj ofte malaperas la patroj. Kio estas infanvartejo oni eĉ ne scias.

Kiam la virino laboras, la pli aĝaj infanoj vartas la malpli aĝajn. Ĉiuj virinoj havas multajn infanojn, ĝis 12, kaj neniu havas malpli ol 6. la infankontribuado ne ekzistas, oni eĉ ne havas salajron, sed vivas el tio, kion donas la tero.

Ekzistas kompreneble ankaŭ multaj privataj lernejoj, speciale en la urboj kaj en la suda parto de la lando. Ilin vizitas la infanoj de la bonstataj grupoj. Tie la lernejoj kotizoj estas tre altaj.

Multaj junulinoj studas ĉe la universitato kaj, laŭdire, ne ekzistas ia formo de seksa diskriminacio. Viro tamen opiniis, ke multaj junulinoj studas ĉe la universitato nur por havi eblecon veni for de la hejmo kaj vivi pli liberan vivon. kaj laŭ li ili preterlasas nenion, kiam temas pri rilatoj kun la vira sekso.

DIFERENCOJ INTER NORDO KAJ SUDO

Oni rimarkas klaran diferencon en la respondoj de la diversaj partoj de la lando. Dum la virinoj en la norda kaj interna partoj ofte vivas needziniĝintaj kaj pro tio ne renkontas kondamnojn, se ili estas solaj kun infanoj, estas aliel en suda Brazilo. Tie estis antaŭ nur kelkaj jaroj sufiĉe neordinare, ke virino naskis infanon sen esti edziniĝinta, se nun tio estas pli kaj pli kutima. Ŝi tamen tiukaze havas sufiĉe grandajn malfacilaĵojn, same kiel ankaŭ ŝia infano.

Virino ankoraŭ plej volonte

mezklasaj familioj havas unu aŭ du servistinojn. Sed ankaŭ en la kamparo, en laboristaj familioj, la viro ne helpas sian edzinon, malgraŭ tio, ke ŝi devas mem ĉion prizorgi en la hejmo.

EKZISTAS VIRAJ KAJ VIRINAJ METIOJ

En la labormerkato ekzistas klaraj viraj kaj virinaj metioj. Kompreneble oni trovas la virojn en la gvidaj pozicioj. Ekzistas tre malmultaj virinaj ĉefoj. La plej bone salajrataj metioj estas t.n. viraj metioj. Laŭleĝe viroj kaj virinoj havu saman salajron por sama laboro, sed en la praktiko ŝajnas esti diferenco, kompreneble malfavora al la virinoj.

Sed la virinoj distingiĝas pli kaj pli, kaj estas pli kaj pli kutime kun virinoj en gvidaj pozicioj.

Kiam virino naskas infanon, ŝi rajtas resti hejme tri monatojn, kiam ŝi ankaŭ ricevas ekonomian rekompencan, t.n. "familian salajron". Ŝi rajtas resti hejme pluajn tri monatojn sen perdi sian oficon, kaj tiam ŝi rajtas ricevi la saman oficon, kiun ŝi havis antaŭ la akuŝo.


Estas tre malfacile havigi lokon en infanvartejo; ofte tio estas tute nekonata ideo. Unu el la intervjuitaj virinoj loĝas en urbo kun 150 000 loĝantoj. Tie ekzistas unu nura infanvartejo. Ĝin prizorgas katolika institucio kaj ili akceptas senkoste infanojn de malriĉaj gepatroj.

MULTAJ VIRINOJ EN SOCIA LABORO

La virinoj partoprenas multnombre en socia laboro kaj estas multaj, kiuj laboras ankaŭ politike. Tio validas precipe pri la mezklasaj virinoj, ĉar ankaŭ politike la laboristaj virinoj estas pli pasivaj. Kaj tio eble ankaŭ ne estas stranga, ĉar multaj el ili estas analfabetaj, sen eblecoj povi ricevi aŭ doni informojn en skriba formo.

Unu el la intervjuitaj virinoj estis gvidantino de infanhejmo en la interno de la lando. Ŝi skribas en sia intervjuo respondo i. a. jene:

"...evidente estas grandega diferenco inter kleraj virinoj en la urboj kaj kamparaninoj, plejparte indianoj kaj nigruoj (eksklavoj), kiuj havas ankoraŭ, post cent jaroj, eĉ preskaŭ afrikajn kutimojn laŭ religio kaj socio.



SENPAGA LERNEJA INSTRUADO

La infanoj en Brazilo ricevas senpagan lernejan instruadon kaj ricevas ankaŭ manĝon en la lernejo. Tio ofte estas la sola manĝo, kiun ili ricevas dum la tago. Tial ofte okazas, ke multaj infanoj vizitas la lernejon nur por havi ion por manĝi, sed estas tro lacaj kaj ne sufiĉe nutritaj por havi fortojn sekvi la instruadon.

estu "netuŝita", kiam ŝi edziniĝas. La viroj vidas en la virinoj unuavice seksobjekton, asertis virino, kiu opiniis, ke proksimume 80% el la viroj, aŭ eĉ pli multaj, precipe tiel rigardas la virinon.

La viroj faras preskaŭ nenion hejme. Neniu el tiuj virinoj, kiujn mi demandis, ricevas ian helpon de sia edzo kun la hejma laboro. Tio parte dependas de tio, ke ĉiuj

Junaj homoj, kiuj havas la bonŝancon povi lerni kaj studi, facile proksimiĝas al la eŭropa nivelo, sed homoj, kiuj restas informe komplete izolitaj — analfabetoj! — kaj plejparte sen televidaj stimuloj, restas komplete ekster la fluo. En tia medio mi vivas ...”

Ĝiaj vortoj pri la situacio de virino en Brazilo formas la finparton de ĉi tiu parto de mia raporto. Mi provis eligi ĝeneralan rigardon, kiel mi perceptis ĝin, sed mi estas konscia, ke multaj pecoj mankas por komplete bildo, i.a. la politika bildo.



BILDO DE INDIANINOJ SUR MIA RETINO

La virinoj, kies bildo restis sur la retino post la vojaĝo en aliaj landoj de Sudameriko, estas la indianinoj. En Bolivio, en Peruo, oni ĉie vidis la kolorriĉajn vestojn de indianaj virinoj, portantaj siajn ŝarĝojn surdorse aŭ sidantaj vendante sur la stratoj.

Mi bedaŭrinde ne povis interparoli kun ili, sed estas malfacile forgesi iliajn fierajn vizaĝojn. Ne estis venkitaj virinoj, kiuj partoprenis kunvenon en La Paz, kie oni festis la tagon de sendependeco. Amasoj da kolorriĉaj vestoj estis videblaj sur la placo, kaj mi tre bedaŭras, ke mi ne povis kompreni la vortojn de la parolanto.

Alian bildon de indianoj, sed bildon humiligan, mi vidis sur Insulo de la suno en la lago Titicaca. Tie vivas ĉirkaŭ 500 familioj, rektaj posteuloj de la iamaj potencaj inkaoj. La infanoj,

kiuj ariĝis ĉirkaŭ ni por vendi siajn kanboatojn, estis ĉifonitaj kaj malpuraj. Kaj ili kaj la virinoj, kiujn ni vidis, donis impreson de ekstrema malriĉeco.

INDIANOJ KAJ MALRIĈECO KUTIMA KOMBINO

Indianoj kaj malriĉeco estas cetere kutima kombino. Oni rakontis al ni, ke la indianinoj ofte edziniĝas nur 12-jaraj, kaj kiam ili estas 20-jaraj, ili jam havas 5 — 6 infanojn.

Sed plej multaj infanoj mortas antaŭ ol ili estas kvarjaraj. Nia gvidisto en Lima, sviso nuntempe loĝanta en Peruo, rakontis pri unu el siaj laboristoj kun indiana edzino; ŝi estis nur 15-jara. Ŝi estis ĵus naskinta sian trian infanon, sola en malpura ĉambro kaj kun rustplena tranĉilo por detranĉi la umbilikan funiklon. Sed, li diris, la infano certe mortos, ĉar ŝi ne havas lakton por ĝi.

Li ne rakontis, kian salajron li donas al sia laboristo, kies infano devos morti pro manko de lakto. Sed li rakontis, ke indianoj estas maldiligentaj kaj pli volonte volas maĉi koka-foliojn ol labori. Narkotiko kaj alkoholo estas grandaj problemoj inter la indianoj, ĉe la virinoj same kiel ĉe la viroj.

Ŝajnas, ke la virinoj respondecas pri la familia vivtenado per sia vendado surstrate. La viroj kulturas la teron kaj la virinoj vendas.

Mi ne estas certa pri la egaleco inter la seksoj inter la indianoj, sed mi havis la impreson, ke la virino ludas tre gravan rolon kaj en la merkato kaj en la familio.

ANKAU ALIAJ VIRINOJ LOĜAS EN LA LANDOJ

kompreneble ankaŭ aliaj virinoj loĝas el la diversaj landoj — tiuj, kiuj vivas en belaj domoj kaj laboras en oficejoj, en lernejoj kaj butikoj; blankaj virinoj, posteuloj de la hispanoj kaj aliaj eŭropanoj. La kontrastoj estas grandaj. Mi tamen imagas al mi, ke la mezklasaj virinoj havas saman egalecon rilate al viroj kiel la kunfratinoj en Brazilo.

Estas tente rakonti ankaŭ pri aliaj aferoj, kiujn mi vidis dum mia vojaĝo, ekzemple pri la mirindaj urboj de la indianoj, aŭ la fabelaj amasoj da oro kaj arĝento en preĝejoj kaj muzeoj; pri la grandegaj diferencoj inter la plej riĉaj kaj plej malriĉaj; pri la

knabeto, kiu venis kun ujo kaj petis manĝon en restoracieto en Rio kaj kiel la homoj fordonis iom de siaj porciegoj. Strange estas, ke mi neniam antaŭe renkontis infanojn en tiaj cirkonstancoj kaj mi ankaŭ neniam antaŭe ricevis tiajn porciegojn da viando kaj alia manĝo. Ankaŭ mi neniam antaŭe pensis, ke homoj povas loĝi en tiaj domaĉoj.

”La sovaĝaj infanoj” en Bogotá vere donis lecionon al mi: ke tio, kion mi antaŭe legis pri ili, estas vero. Kompatindaj virinoj, kiuj devas travivi, ke iliaj infanoj vivas sur la strato kaj akiras sian manĝon per ŝtelo. Mi ankaŭ konstatis, ke veras, ke ne eblas porti brakhorloĝon, nek ringojn nek kolĉenon, kaj absolute ne fotilon.



LA PEJZAĜO MULTLOKE ESTAS MIRINDA

Mi povus skribi longan raporton pri la pejzaĝo en si mem. Mi travivis kaj someron kaj vintron, eĉ tropikan varmegon. La kongresurbo mem, Brazilio, estis travivaĵo; nova urbo konstruita ne por homoj, sed por aŭtoj. Mi vidis tiom da rave belaj lokoj, sed ankaŭ multajn nudajn sterilajn regionojn. Sur la altaĵoj en La Paz kreskis apenaŭ io, dum en Quito ĉe la ekvatoro, en Ekvadoro, estis tropika verdaĵo.

Multajn impresojn mi devis enfermi en la memoron kaj limigi mian skribadon al infanoj kaj virinoj, ĉar tion mia raporto ja celis.

Märtha Andréasson

Unu el la plej gravaj dum la lastaj jardekoj

Certe unu el la plej gravaj okazoj sur la kampo de la esperantojurnalismo, almenaŭ dum la lasta jardeko, se ne dum la tuta postmilita periodo, estis la ekapero de la monata aktuala revuo *MONATO*, tute en esperanto. La *Espero* plurajn fojojn prezentis tiun revuon, sed ĝi meritas reprezentadon.

Somere la germana revuo *Esperanto aktuel* aperigis intervjuon kun **Stefan Maul**, la ĉefredaktoro de *Monato*. Ĝi enhavas multajn interesajn informojn, pro tio ni volonte represas ĝin por la svedaj esperantistoj.

Kial en varbaj anoncoj vi nomas vian revuon unika?


Nu, *Monato* estas unika laŭ diversaj aspektoj. Unue ĝi sendube estas la plej granda revuo, kiu ne estas organo de iu asocio, kiun do ne ricevas membroj, sed libere aĉetas abonantoj; tial ĝi estas vere sendependa en la senco, ke ĝi dependas nur de la aĉetemo de esperantistoj, ke do temas pri privata komerca entrepreno.

Sed ekzistas ankaŭ aliaj tiaj revuoj ...

Certe, jen estas ekzemple *Fonto*, kiu estiĝis post *Monato*, jen estas *La kancer-kliniko* kaj la jam multjara *Literatura foiro*. Sed en ĉiuj tiuj kazoj temas pri specialaj revuoj kun speciala legantaro. *Monato* kontraste estas multe pli ampleksa (11-foje jare 40 grandaj paĝoj!) kaj krome estas tute ordinara revuo — kaj ĝuste en tio troviĝas la unikeco: ĝi estas revuo ĉiutema, kiaj ekzistas ankaŭ en naciaj lingvoj, sed ĝi uzas la internacian lingvon. Recenzintoj komparis ĝin kun *Der Spiegel* aŭ *Newsweek* aŭ *Time*, sed kompreneble tiu komparo estas tro aŭdaca. Laŭ mia scio neniam dum pli longa tempo ekzistis tia revuo en esperanto.

Nu, la sama La praktiko estis simila

Simila, ja. Sed ĝi havis specialan celon: liveri lego-materialon por lernantoj de la lingvo, kaj ĝi, ekzemple, ne okupiĝis pri politiko. *Monato* kontraste tute ne intencas liveri ekzerco-materialon, ja entute ne okupiĝas pri esperanto mem. Ĝi estas politika, ekonomia, kultura revuo por homoj, kiuj scias la internacian lingvon. Parenthese: ke *Monato* estas ankaŭ ideala por lerni kaj ekzerci la ĉiutagan lingvon, estas — kvankam ne intenco — tamen grava apuda



efiko. Tial ni ja ankaŭ rekomendas ĝin aparte por kursoj de progresintoj. Sed la vera unikeco de *Monato* troviĝas sur alia ebena, la ĵurnalisma. La premiso por krei tian revuon ja estas unika, specifa por la esperanto-movado. Tiam premison povas havi neniu nacilingva revuo. Ni havas en la movado tutmonde (kun kelkaj esceptoj, koncedite) unikan reton de kunlaborantoj por tia revuo, esperantistojn, kiuj regas ĉiuj la saman lingvon kaj tamen estas indiĝenoj de la koncernaj landoj. Krome ni havas en la movado ĉiuspecajn fakulojn.

*Sed ili ja ne ĉiuj estas ĵurnalistoj, dum la nacilingvaj revuoj havas siajn korespondantojn ĉie, do profesiajn ĵurnalistojn. Ĉu do temas pri diletantaj aŭtoroj, kiuj verkas por *Monato*?*

Certe, inter ili troviĝas ankaŭ diletantoj, sed mi preferas nomi ilin "amatoraj". Ĉiuj kunlaborantoj ricevas de ni detalajn instrukciojn, konstantan trejnon per interna bulteno por niaj kunlaborantoj, kaj nun ni preparas eĉ manlibron pri ĵurnalismo. La amatoreco de niaj kunlaborantoj havas ankaŭ avantaĝojn: ili ne vidas, kiel ofte la profesiaj ĵurnalistoj, nur la tielnomatajn sensaciojn, sed ili vidas la realan mondon ĉirkaŭ si kaj elektas ofte temojn, pri kiuj oni en neniu alia revuo povas legi.


Vi do havas, se ni ĝuste vidas, kompare al nacilingvaj revuoj, la avantaĝon, ke vi ne devas sendi korespondantojn al la diversaj landoj por ricevi de ili raporton, ĉar viaj korespondantoj jam sidas en la tuta mondo.

Ĝuste. Ni simple ekspluatas la nekredeble grandan potencialon de la esperanto-movado. Sen vera reklamado jam post ege mallonga tempo ni havis la necesajn kunlaborantojn, kaj nun estas tiom da ili, ke per la materialo, kiun ili liveras, ni senprobleme povus plenumi tian revuon ĉiusemajne. Kompreneble nia sistemo havas la kroman avantaĝon, ke ni ŝparas la gigantajn sumojn, kiujn devas elspezi nacilingvaj revuoj por siaj korespondantoj, ĉar ni devas pagi nur honorariojn al niaj aŭtoroj.

Sed la ĉefa unikeco troviĝas en alia, tre grava fakto: la korespondantoj de nacilingvaj revuoj (kaj de la inform-agentejoj!) ĉiam estas kaj restas fremduloj en la landoj, el kiuj ili raportas. Germana aŭ usona ĵurnalisto ĉiam raportos el Japanio aŭ

Brazilo per okuloj de germano aŭ usonano, do kutime tute ne adekvate al la koncerna lando. Kaj ne forgesu la lingvan problemon; eĉ se iu dum multaj jaroj restadas en certa lando kaj perfekte lernis la koncernan lingvon, jen estas restoj de nescio kaj nekompreneo. Sed reale ja tiuj profesiaj ĵurnalistoj — precipe la usonaj — nur supraĵe scias la lingvon de la lando, uzante por sia laboro precipe la anglan lingvon. Iliaj informaj fontoj do plejparte estas homoj, kiuj ankaŭ regas la anglan lingvon, aŭ ili devas uzi la servojn de interpretistoj. Nu, al esperantistoj mi ne bezonas klarigi, kion tio signifas.

Ĉu per tio vi volas diri, ke tiuj profesiaj ĵurnalistoj raportas malĝuste?



Jes, ankaŭ tio. Sed prefere ni rigardu la unikan avantaĝon, kiun havas la sistemo de *Monato*: por ĝi raportas preskaŭ nur indiĝenoj el la diversaj landoj, do homoj, kiuj profunde konas la fonojn lingvan, kulturen, historian, socian de sia lando. Ili do ne nur povas ĝuste juĝi pri aferoj de sia lando, sed precipe ne povas fari erarojn, kiujn aŭtomate kaj necese faras eksterlandano.

Krome aldoniĝas la unika avantaĝo de la lingvo: niaj kunlaborantoj ne devas traduki el fremda lingvo en sian gepatran, sed inverse ili povas libere verki en nia komuna lingvo, kaj eĉ se temas pri tradukoj, estas kompreneble multe pli bone traduki el gepatra lingvo en esperanton ol traduki el fremda en sian propran lingvon. Tiun ĉi avantaĝon cetere — eble pro kaj per *Monato* — nun ekkonis

ankaŭ brita tradukservo, kiu intencas simile kiel ni ekspluati ĉi tiun faktan. Sed jen estas alia unikaĵo de *Monato*: niaj kunlaborantoj tute ne tradukas, se ne temas pri dokumentoj aŭ intervjuoj kun neesperantistoj. Principo de *Monato* estas aperigi nur originale verkitajn artikolojn, tiel ke do fakte ĉiam temas pri ekskluzivaj verkaĵoj, neniam aperintaj ie alie. *Monato* do ne estas iu *Readers' Digest*, kiu aperigas tradukojn de artikoloj aperintaj jam ie, sed ĉiam temas pri artikoloj verkitaj ekskluzive por *Monato*.

Sed ĉu en ĉi tiu via principo ne estas granda risko? Eksterlandaj ĵurnalistoj povas pli kritike kaj objektivaj raporti ol indiĝenoj, kiuj pli-malpli kritike prezentas la starpunkton de sia propra

lando aŭ registaro. Ĉu do en Monato temas pri subjektivaj anstataŭ objektivaj raportoj?

Se mi akceptus ĉi tiun vidpunkton, mi devus esti ofendita. Ĉu vi kredas ke mi kiel germana ĵurnalistoj estas ne-objektiva pri germanaj aferoj? Kompreneble oni povas senfine diskuti pri la termino "objektiva", sed fakto ja estas, ke laŭ la principoj de okcidenta ĵurnalismo gazetoj estas kritikaj kontrol-instancoj. Cetere, prezenti, ekzemple, starpunkton de registaro ja ne estas aŭtomate propagando. Niaj gazetoj ĉiutage raportas eldirojn kaj asertojn de regantoj. Dum mi indikas, ke tiu politikisto diris tion kaj tion, jen temas pri ordinara "objektiva" informo. Risko estas nur ĉe raportoj el totalismaj landoj, ĉar tie oni havas tute alian koncepton pri

ĵurnalismo: amas-komunikiloj en tiuj landoj devas propagandi la starpunkton de registaro aŭ partio. Nu, tamen ne timu, ke propagando tiuspeca povas eniri *Monaton*, kies redaktoro ja sidas ĉiutage en ĵurnal-redakcio kaj do estas bone informita kaj informata pri la eventoj en la tuta mondo.

Cetere, se vi observas *Monaton*, vi konstatos, ke en ĝi aperas ĉiunumero du kompletaj paĝoj kun leteroj de legantoj. Mi ne konas iun alian esperantorevuon, kiu tiel abunde ricevas leterojn. Ili tre ofte korektas, kompletigas aŭ kritikis starpunktojn esprimitajn en artikoloj de *Monato*. Do ni havas en *Monato* — ankaŭ kontraste al nacilingvaj revuoj — kroman kontrol-istancon. Se mi kiel germano en germana periodaĵo legas ion pri iu fora lando, mi ne povas kontroli, ĉu ĉio estas vera. Sed *Monato* havas ja legantojn en ĉiuj landoj el kiuj ni raportas, kaj ili do povas kontroli, ĉu ni estas objektivaj, ĉar kompreneble la diversaj legantoj en tiu lando ja supozeble ne havas la saman politikan kaj partian starpunkton kiel, ekzemple, la aŭtoro. Do, eĉ se nia aŭtoro provus propagandi certan politikan direkton, li riskus kontraŭbaton far aliaj samlandanoj.

Ĉu la estonteco de Monato jam estas certigita? Kiel vi intencas kreskigi la nombron de abonantoj?

Jes kaj ne, se temas pri la estonteco de *Monato*. Certigita ĝi estas en tiu senco, ke la eldonejo TK/Stafeto povas vivteni ĝin dum kelka tempo ankaŭ sen profito. Averaĝa tempo por sukcesigi tian revuon, laŭ la spertoj de la branĉo, estas ĉirkaŭ kvin jaroj. Ni aperas nun dum la tria jaro kaj havas proksimume 1700 pagantajn abonantojn — sufiĉe alta nombro, sendube, por la esperanto-merkato, tamen ne sufiĉa por vivteni ĝin daŭre. Profiton ni havos nur ĉe iom pli ol 2000 abonantoj, sed por egaligi la deficitajn de la unuaj jaroj ni ja bezonas konsiderinde pli multajn abonantojn. Kaj jen la vera problemo: kiel atingi la abonemulojn?

Monato ja evidente ne turnas sin al la aktivuloj de la esperantomovado, pri kiu ĝi okupiĝas nur

okaze. Certe, *Monato* estas unu el la plej taŭgaj propagandiloj por konvinki neesperantistojn pri la valoro de la internacia lingvo. Tion jam ekkonis tre multaj aktivuloj kaj ankaŭ tial abonas ĝin, ĉar senhonte ili povas montri ĉi tiun revuon al kiu ajn, dum ekspozicioj, dum verb-vesperoj k.s.

Konsiderante tion fakte ĉiu esperanto-grupo devus aboni *Monaton* — kaj per tio ni jam estus savitaj. Se ĉiu esperanto-grupo en la tuta mondo abonon nian revuon, ni havus la necesan abonantaron. Sed celo de *Monato* ja ne estas, unuoline, liveri propagandan materialon al aktivuloj. La vera potencialo de tia revuo fakte troviĝas ekster la movado. Temas pri tiuj homoj, kiuj lernis la lingvon ne por movadumi, sed por profiti de ĝi praktike.

Sed kiel vi atingas tiujn homojn ekster la movado?

Ĝuste jen la problemo: ni povas uzi nur la ordinarajn inform-

kanalojn de la movado. Neniu havas la milojn da adresoj de tiuj homoj, kiuj lernis la lingvon sed, konstatinte, ke la movado donas al ili nur limigitajn eblecojn praktike apliki la lingvon, tute ne aliĝis al iu grupo aŭ organizo aŭ forlasis ĝin. Se ni havus la necesan monon por meti anonceton pri *Monato* en ĉiuj ĵurnaloj de la mondo, ni tuj havus supozeble multmilan abonantaron.

Ĉu vi ne vidas eliron? Kion povus fari esperantistoj por garantii kaj ebligi la daŭran ekzistadon de tiel sendube grava revuo?

Nu, estus jam granda progreso kaj ioma helpo por ni, se ĉiuj funkcioj konscius pri ĉi tiu graveco kaj atentigus ankaŭ aliajn pri *Monato* kaj ĝia propaganda efiko. Laŭ pli longa perspektivo plej bona helpo estos, se ĉiu kursgvidanto prezentos al siaj kursanoj (plej malfrue en kurso por progresintoj) nian revuon.

Ne malofte ni spertas, ke homoj diras: per *Monato* mi

revenis al esperanto. El tio oni do povas konkludi, ke per *Monato* oni pli facile povas teni lernintojn en la movado. Krome *Monato* por kursoj de progresintoj estas ideala ekzerco-materialo, ĉar ĝi estas laŭ enhavo tre varia, aktuala kaj interesa, kaj ĉar ĝi peras la ĉiutagan lingvon same kiel la lingvon de la plej gravaj faktoj. Nelaste tial ni ekzemple donas rabaton por kurs-abonoj.

Sed, kiel dirite, tio helpas nin nur laŭ pli longa perspektivo. Sed ni ja urĝe bezonas pliajn abonantojn, kaj en tio povas subteni nin ĉefe individuaj esperantistoj, ĉar ili parte konas tiujn homojn, pri kiuj mi parolis supre, nome tiujn, kiuj lernis la lingvon, sed ne "movadumas". Tia varbado, cetere, plejparte povas efiki sur regiona ebena; mi jam ofte konstatis ĉe regionaj esperanto-renkontiĝoj, ke tie estas ne malmultaj esperantistoj, kiuj neniam aŭdis pri *Monato*, ĉar ili ne membras en la grandaj esperanto-organizoj, tamen tenas kontakton kun regionaj organizoj, grupoj k.s.

Kio pri landoj, el kiuj oni ne povas pagi al la eldonejo? Ni povas imagi, ke precipe tie oni avidas havi tian revuon.

Kompreneble la merkato por *Monato* en, ekzemple, la orienteŭropaj landoj estus grandega; momente ni povas solvi ĉi tiun probemon preskaŭ nur per donac-abonoj — sed ĉu vi povas imagi pli taŭgan donacon ĝuste por geamikoj en tiuj landoj ol estas *Monato*?

Per tio finiĝas la intervjuo kun la ĉefredaktoro Stefan Maul. Svedio ne apartenas al la landoj, el kiuj ne eblas pagi abonon al *Monato*. Tute kontraŭe! Svedio estas unu el la landoj, kie abono plej malmulte sentiĝas ekonomie, malgraŭ la ĵusa devaluto de la sveda krono. Jara abono por *Monato* dum 1983 kostas 145 kronojn. Se vi aldonas pliajn 15 kronojn vi ricevos la jarlibron-kalendaron de *Monato*, "La jaro 1983", kun aroj da utilaj informoj. Do 145 skr sen "La jaro" kaj 160 skr kun "La jaro". Oni abonas ĉe Eldona Societo Esperanto kaj pri la pagmaniero atentu anoncon en ĉi tiu numero de la gazeto.

PRENU MERERA


| | |
|----------------------------|----------------------|
| El popola Ĉinio | 1 år 45 kr |
| | 2 år 75 kr |
| | 3 år 110 kr |
| Fonto | 95 kr |
| Heroldo | 88 kr |
| Kancerkliniko | 45 kr |
| Kontakto | 49,50 |
| Kulturaj kajeroj | 45 kr |
| Literatura foiro | 50 kr |
| Monato..... | inkl. La jaro 160 kr |
| | exkl. La jaro 145 kr |
| Norvega esperantisto | 42 kr |
| Oomoto | 35 kr |
| Planlingvistiko | 35 kr |

Postgiro 59 67 68-2. Esperantoförlagets Prenumerationskonto.
Förfrågningar: åke Palm, tel. hem 040-15 40 40.

Årets nya böcker

Två fina antologier hör till den intressantaste utgivningen i år. Egentligen är de tryckta redan året innan, men distributionen är långsam.

Moderna kroatia prozo är en respektingivande presentation av översatt kroatisk prosa från vårt århundrade. Boken är tjock, 600 sidor, och innehåller noveller av 34 författare. Sist i boken finns en kort presentation av varje författare. Boken är dyr, omkring 230 kronor, men det är värt en del att få bra texter samlade i ett snyggt band, i stället för att tänka sig att novellerna gavs ut i småhäften.



Järnvägsälskarna blir fler och fler, och nu har de fått en egen antologi: *La verda relo, beletra antologio pri la fervojo*. Vid esperantokongressen för järnvägare 1981 ordnades en litterär tävling, och här är de noveller och dikter som fick pris. Ett av bidragen är från Sverige.

EN STOKO /I LAGER

Ĉi tiu prezaro estas farita antaŭ la devaluto. **Mendu inter la unuaj kaj vi pagos laŭ ĉi tiuj malaltaj prezoj!** Kiam necesos havigi pli da ekzempleroj el eksterlando, la prezoj estos 20% pli altaj. Notu sur via mendo, ĉu vi en tia kazo rezignos pri la libro.

Den här prislistan gjordes före devalveringen. **Beställer du bland de första, betalar du fortfarande de här låga priserna!** När lagret behöver fyllas på från utlandet, blir priserna ca 20% högre. Ange på din beställning om du i så fall vill avstå från boken.

FAKAJ LIBROJ

- Auld, William:* Pri lingvo kaj aliaj artoj, 216 p 67,50
Barcsay, Zs. Red): Metodiko en la praktiko, 122 p 54,—
Blanke, Detlev: Plansprache und Nationalsprachen, 162 p 34,—
Blanke, Detlev: Socipolitikaj aspektoj de la esperanto-movado, 228 p 60,—
Boulton, Marjorie: Zamenhof — Creator of esperanto, 223 p 72,—
Butler, M.C.: Klasifo de esperantaj temoj, 144 p 7,—
Chiussi, Italo: Je la flanko de la profeto, 362 p 107,—
Darbellay, Christian: Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko 1981, 275 p 115,—
Dratwer, Isaj: Lidja Zamenhof, 112 p 39,—
Drezen, E.: Zamenhof, 49 p 14,—
Energio, 62 p. 24,—
Lapenna, Ivo k. a.: Esperanto en perspektivo, 844 p 272,—
Eichholz, R. kaj V. (red): Esperanto, la solvo de niaj lingvaj problemoj, 472 p 150,—x)
Esslemont, J.E.: Bahá'u'lláh kaj la nova epoko, 321 p 38,—
Eternan gloron al Maŭ Zedong, 38 p 2,50
Forster, Peter G.: The esperanto movement, 413 p 115,—
Gjivoje, M.: Konsultlibro pri esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj, 56 p 36,—
Gjivoje, M.: Panoramo de esperanta literaturo, 282 p 43,50
Gregor, D.B.: La esperanta traduko de la malnova testamento, 58 p 6,—

Hegeler, Inge kaj Sten: ABZ de amo, 274 p 110,—
Hauptenthal, R.: Listo de mallongigoj, 16 p 14,—
Henriksson, Gösta: El la vivo de Ludoviko Zamenhof, 16 p 6,—
 Interlingvistikaj kontribuaĵoj, 125 p 62,—
Jung, Teo: Ĉiu ĉiun, 400 p 157,—
Kalocsay K.: La gramatika karaktero de la esperantaj radikoj, 20 p 15,—
Kalocsay, K.: Lingvo — Stilo — Formo, 160 p 21,50
Kato, Seiiĉi: Lernolibro pri oftalmologio, 123 p 8,—
Kojc, Martin: La lernolibro de la vivo, 111 p 20,—
Landmark, Margrete: Infanpsikologio, 188 p 81,—
Laval, R.: Pri la esperanta literaturo, 16 p 3,—
Lundberg, Gustaf: *Kredo al Dio en la atomepoko*, 46 p 6,—
Markheden, Malte: Svenska fåglar, sve-esp och esp-sve ordbok, 13 p 15,—
Neergaard, Paul (red): Esperantologio, 73 p 6,—
Nothnagel, Hermann: La mortado, 27 p 2,50
Olsson, Ernst: Kredo — Floroj — Dinamito, 79 p 18,— (broŝ) 25,— (bind)
Piron, Claude: Kiel personeco sin strukturis, 108 p 76,—
Privat, Edmond: Esprimo de sentoj en esperanto, 60 p 28,50
Ribot, A.: Aŭtografoj de dro L.L. Zamenhof 7,—
Salan, Georges: La nuda vero, 188 p 30,—
Sekelj, Tibor: Mondo de travivaĵoj, 286 p 80,—
Sekelj, Tibor: Tra lando de indianoj, 186 p 32,—
 Unua simpozio pri komputiko, 269 p 85,—
Sinha, L.: Jaroj sur tero, 126 p 22,— (broŝ) 30,— (bind)
Vorilhon, Claude: La libro, kiu diras la veron, 144 p 71,—
Waringhien, Gaston: 1887 kaj la sekvo, 293 p 110,—
Wells, John: Lingvistikaj aspektoj de esperanto, 76 p 41,—
Zamenhof, Marko kaj lazaro: Proverboj, 704 p 190,—

BELETRO

Adamson, Hendrik: Vesperkanto (poemoj), 131 p 25,—
Andersen, H.C.: Fabeloj, vol. IV, 240 p 50ü—
Andrić, Ivo: Vizaĝoj (noveloj), 60 p 22,—
Baghy, Julio: En maskobalo (teatraĵo), 141 p 25,—
Ba Jin: Aŭtuno en la printempo (romano), 96 p 23,—
 Baza literatura krestomatia, 266 p 56,—
Lord Byron: Don Johano (poemo), 69 p 32,—
Baupierre, Henri: Specimene (pasticoj), 131 p 11,—
Benedek, Elek: Hungaraj fabeloj, 70 p 33,—
Boulton, Marjorie: Virino ĉe la landlimo (teatraĵo), 196 p 23,—
Böll, Heinrich: La perdita honoro de iu Katarina Blum (romano), 154 p 52,—
Camoës: La Luzidoj (poemo), 464 p 145,—
Cervantes, Miguel de: Don Quijote (romano), 820 p 230,—

Får man skriva så här?


En roman som blivit mycket omdiskuterad är *Litomiŝla tombejo* av Karolo Piĉ. Bakgrunden till handlingen är självbiografisk och ger glimtar ur esperantorörelsen. Men författaren trampar på de ömmaste tårna och experimenterar hejdlöst med orden, även på sätt som strider mot alla grundregler.




Från Kina

Romanen *Kanto de juneco* är en kinesisk bästsäljare, en roman om ung kärlek och om politiskt uppvaknande. Författarinnan heter Yang Mo. Den har sänts ut i bokklubben ("NovaLibro") och i bokklubben kommer också tre kinesiska bilderböcker. *Simio provas elakvigi la lunon* är två enkla berättelser med mycket levnadsvisdom i all enkelheten, och *Pesi elefanton* innehåller berättelser av folksagokaraktär.

En tredje bilderbok är *Neĝa infano*, en berättelse för barn om en snögubbe.





Tom Sawyer som serie

Den kända amerikanska äventyrsboken Tom Sawyer lämpar sig väl för bildsättning. Från Ungern kommer ett häfte med en tecknad serie, *La aventuroj de Tom Sawyer*. Den är i svart-vitt och starkt nedkortad, men pedagogiskt är det intressant att läsa korta bildberättelser om kända figurer för nybörjare.

Andra översättningar

Om *Moderna kroatia prozo* är samlad i en volym, så har det också getts ut en rad översättningar ur olika hörn av världen, i små häften och av skiftande kvalitet.

Imenlago av Theodor Storm är en översättning från tyska men utgiven i Kina, och den novellen ska väl läsas just i det här lilla enkla formatet. *Vizaĝoj* av Ivo Andrić verkar däremot hoptryckta i sin lilla volym, när man tänker på att Andrić är mest känd för stora tjocka romaner. Grgur Karlovčan är en kroatisk författare från vårt århundrade, som presenteras med åtta noveller i *Novelaro*. För oss lika dåligt känd är den japanske författaren Kan Kikuĉi, som nu getts ut på esperanto med två noveller i *Konduto de grandsinjoro Tadanao*. Novellerna har ämnen från konflikter i japansk historia.

Två författare som är mer kända i Sverige är Guy de Maupassant och George Orwell. Den förres berättelse *Boule de suif* och den senares *La bestofarmo* har getts ut på esperanto, *La bestofarmo* i sin andra upplaga. Maupassants bok är ett snyggt häfte, man skulle bara önska att det fanns en antydan på bokens framsida att det är en

- Ĉapek, Karel*: Rakontoj el la unua poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo, 285 p 31,—
Chaucer, Geoffrey: Prologo el la Rakontoj de Canterbury (poemo), 12 p 14,—
Cocteau, Jean: La fatomaŝino (teatraĵo), 125 p 49,—
 El ĉina poezio, 135 p 23,—
 En frua majmateno (poezio), 16 p 2,50
Engholm, Stellan: Junuloj en Torento, 144 p 34,—
Erkko, J.H.: Spegulo homarana (maksimoj), 6,50
Eroŝenko, V.: Lumo kaj ombro (verketoj), 95 p 35,—
Eroŝenko, V.: Malvasta kaĝo (verketoj), 87 p 35,—
Eroŝenko, V.: La tundro ĝemas (verketoj), 83 p 35,—
Esĥilo: Prometeo ligita (teatraĵo), 54 p 49,—
Fisker, Robert: Morsoklubo (infanrakonto), 31 p 8,—
Fitzgerald, Edward: La robajoj de Omar Kajam (poemoj), 49 p 40,—
Flood, David: Mi serĉis oron kaj oleon sed trovis... (rakonto), 132 p 25,—
Georgiev, Ivan St.: Provo alfronti la vivon (poemoj), 111 p 20,—
Goldoni, Carlo: La gastejestrino (teatraĵo), 154 p 93,—
Goodheir, Albert: Merlo sur menhiro (poemoj), 32,—
Grimm, fratoj: Elektitaj fabeloj, 199 p 76,—
Helm, Axel A.: Bona rido ... (anekdotoj), 85 p 15,—
Hernández, José: Martín Fierro (poemo), 289 p 25,—
Hooft, P.C.: Amoro kaj amo (poemoj), 15 p 2,50
Ibsen, Henrik: Brand (teatraĵo), 320 p 70,—
Ibsen, Henrik: Peer Gynt (teatraĵo), 258 p 87,—
 Japanaj fabeloj, 70 p 36,—
 Junulara kantareto 3, 46 p 13,—
Kalocsay, K.: Izolo (poemoj), 77 p 22,—
Kawabata, Yasunari: Neĝa lando (romano), 118 p 50,—
Karlovčan, Grgur: Novelaro, 33 p 11,—
Kemalov, Naĉo: Naŭ jaroj en la infero (rakonto), 111 p 55,—
Kikuĉi Kan: La konduto de grandsinjoro Tadanao & Balotado (noveloj), 75 p 52,—
Kišon, Efraim: Elektitaj satiroj, 111 p 45,—
Kivi, Aleksis: Sep fratoj (romano), 360 p 25,—
Kock, Edwin de: Fajro sur mia lango (poemoj), 119 p 11,—
Krĉmar, Stjepan: Tri noveloj, 69 p 20,—
Krilov, J.A.: Elektitaj fabeloj, 336 p 65,—
Krusten, Erni: Okupacio (romano), 91 p 10,—
Lagerlöf, Selma: La ringo de la generalo (romano), 125 p 15,—
Lermontov, M.J.: Kaŭkazaj rakontoj, 70 p 17,—
Liu Si: Neĝa infano, 40 p 15,—
Lorjak: Neologisme, 88 p 15,—
Lorjak: Regulus (romano), 339 p 92,—
Lusin: Matenaj floroj kolektitaj en vespero (eseoj), 158 p 15,—
Lusin: Noveloj — plena kolekto, 488 p 50,—
Lusin: Sovaĝa herbaro (prozpoemoj), 87 p 3,50
Martinson, Harry: Aniaro (poemo), 174 p 70,—


Maupassant, Guy de: Boule de suif (novelo), 59 p 62,—
Maupassant, Guy de: La normandaj rakontoj, 210 p 60,—
Maŭ Zedong: Poemoj, 68 p 15,—
Masao, Miyamoto & Ueyama: L'omnibuso kun tri pasaĝeroj (poemoj), 65 p 40,—
Masao, Miyamoto: Skiza historio de la utao (poezio), 85 p 50,—
Meng Kinggiang: Liu Hulan (bildrakonto), 40 p 10,—
Migliorini, Elio (red): Esperanta legolibro, 256 p 23,—
Milne, A.A.: Winnie-la-Pu (infanlibro), 164 p 60,—
Morgenstern, Christian: Pendumilaj lidoj (poemoj), 107 p 39,—
Moderna kroatia prozo, 606 p 200,—
Omelka, F.: La alaska stafeto & Kaptitoj de la glaciĝoj (rakontoj), 96 p 10,—
Orwell, George: La bestofarmo (romano), 108 p 49,—
Orzesko, E.: Marta (romano), 213 p 39,—
Otto, Elsa: Joĉjo (rakonto), 94 p 32,—
Pesi elefanton (infanlibro), 91 p 33,—
Piĉ, Karlo: Angoro (poemoj), 97 p 75,—
Piĉ, Karlo: La litomiŝla tombejo, 276 p 175,—
Pilger, Wouter: Ne ĉiam (poemoj), 15 p 2,50
Privat, Edmond: Karlo (rakonto), 47 p 10,—
Poppeck, F.W.: La vivo estas tute alia (aforismoj), 32 p 20,—
Potts, Bertram: Poezia bukedo por infanoj de la tuta mondo, 102 p 65,—
Rosbach, J.H.: Disko (noveloj), 109 p 27,—
Rosbach, J.H.: Fianĉo de l'sorto (romano), 192 p 28,—
Rosbach, J.H.: La mirinda eliksiro (noveloj), 99 p 20,—
Rossi, Nicolino: Sur la vivopado (poemoj), 111 p 54,—
Ragnarsson, Baldur: Islandaj pravoĉoj (rakontoj kaj poemo), 110 p 18,—
Schneider, Alois: Barbro kaj Eriko (romaneto), 40 p 11,—
Schwartz, Raymond: Verdkata testamento (poemoj), 121 p 33,—
Shakespeare, William: Hamleto (teatraĵo), 206 p 26,—
Skota antologio, 255 p 55,—
Slösser-Bresler, B.M.: Erna (infanrakonto), 52 p 45,40
Storm, Theodor: Imenlago (rakonto), 39 p 10,—
Strindberg, August: La konscienco riproĉas (romano), 58 p 5,—
Strindberg, August: Pasko (teatraĵo), 88 p 20,—
Sveda poemaro, 112 p 15,—
Szilágyi, Ferenc: Inter sudo kaj nordo (rakontoj), 185 p 25,—
Szilágyi, Ferenc: Koko krias jam (noveloj), 197 p 50,—

översättning till esperanto. Orwells bok kan till utseendet inte jämföras med översättningar till svenska, men den är illustrerad och innehållet är förstås detsamma.

Kåserier och poesi

På esperanto hittar man inte så ofta kåserier av den lätta art som finns i dagspressen. *Elektitaj satiroj* av Efraim Kiŝon fyller här en lucka. De är översatta från hebreiska, och författaren är känd långt utanför sitt hemland. Boken har gått ut till medlemmarna i bokklubben.

Poesi hittar man ofta på esperanto, dock inte så ofta i den form som *La Luzidoj* av Luiz Vaz de Camoes har. Det är ett mäktigt versepos i översättning från portugisiska. Originallet skrevs på 1500-talet.



Facklitteratur mest om esperanto

Då och då händer det väl att man som esperantist letar efter något som någon skrivit för några år sedan, och önskar att man hade bättre ordning på sig. Sådana texter som t ex M'Bows tal till kongressen i Reykjavik finns samlade i den tvåspråkiga boken *Esperanto, la solvo de niaj lingvaj*

- Tagore, R.*: Malsata ŝtono (rakontoj), 127 p 45,—
Thorsen, Poul: Rozoj kaj urtikoj (poemoj), 117 p 10,—
Urbanová, Eli: El subaj fontoj (poemoj), 95 p 17,—
Ulenspieghel, tio estas Strigspegulo (popolrakonto), 15 p 2,50
Waringhien, Gaston: La klasika periodo (poezio), 252 p 69,—
Valano, Johán: Ĉu li venis trakosme? (romano), 144 p 80,—
Verloren van Themat, W.A.: La akvariinfanoj (romano), 64 p 12,—
Vivu la stel'! (kantareto), 62 p 3,—
Villon, Francois: Soife mortas mi (poemoj), 15 p 2,50
 La verda relo (antologio), 66 p 6,—
Xia Xia: Simioj provas elakvigi la lunon, 16 p 12,—
Yang Mo: Kanto de juneco (romano), 303 p 33,—
Zilahy, Lajos: Printempo de morto (romano), 121 p 20,—

BILDSTRIAĴOJ

- Cosciny & Uderzo*: Asteriks la gaŭlo 48 p 45,—
Herhé: Tinĉjo — la krabo kun oraj pinĉiloj 62 p 47,—
Horváth & Dargay: Tom Sawyer 28 p 21,—

LERNOLIBROJ

- Auld, William*: Paŝoj al plena posedo (progresiga) 229 p 56,75
Behrmann, Hermann: Ek! 191 p 35,— (kasedo 50,—)
Chaves, Sylla: Nova amiko inter ni 86 p 27,— (kasedo 80,—)
Corsetti & La Torre: Ĉu vi parolas tendare? 27 p 17,—
 Jen nia mondo 1 (sveda) 74 p 32,— (kun kasedo 75,—
 ĝis fino de '82)
 Jen nia mondo 2 (angla) 89 p 47,75
Lindén, Frits: Esperantokurs 276 p 25,—
Malmgren, Ernfrid: Allas andra språk 126 p 20,—
Seppik, Henrik: La tuta esperanto (progresiga) 180 p 27,—
Szilágyi, Ferenc: Ellernul (progresiga) 121 p 27,—

GRAMATIKOJ

- Carlén, Erik*: Svensk esperantogrammatik 94 p 30,—
Kalocsay & Waringhien: Plena analiza gramatiko de esperanto 599 p 140,—

VORTAROJ

- Fervoja terminaro sve-esp & esp-sve 167 p 27,—
 Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj 282,—

problemoj. De flesta texterna finns på både esperanto och engelska. Boken är på över 400 sidor, sammanställd av R. och V. Eichholz.



Dokumentära på liknande sätt är *Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko 1981*, sammanställd av C. Darbellay med korta presentationer av 200 av de vetenskapsmän som använder esperanto, och *Proverboj* av M. och L. Zamenhof. Adolf Holzhaus har här samlat och alfabetiskt ordnat på flera språk de ordspråk som ofta refereras till i esperanto, en komplett dokumentation med Holzhaus vanliga grundlighet, på 700 sidor.

Liten men behövlig är Reinhard Hauptenthal's *Listo de mallongigoj*. Även i esperantovärlden har förkortningsraseriet gjort sitt intåg, och här finns de vanligaste samlade.

Ett kompendium om interlingvistik är *Interlingvistikaj kontribuaĵoj*, utgiven i Paderborn, vilket borgar för en viss nivå på innehållet.

Ett helt annat ämne tas upp i Margrete Landmarks kompendium *Infanspsikologio, elektitaj temoj*. Boken innehåller föreläsningar från 1978, och ger en grundläggande översikt över barnpsikologin, ett ämne som inte är särskilt väl tillgodosett på esperanto.

Ulla Luin



(de p. 58)

nun — kun la ŝanĝo ke la "grandlingvanoj" devos iom adaptiĝi al la situacio, kiun plej multaj aliaj travivas ĉiutage. Mi certas, ke ne daŭrus longe antaŭ ol ĉiuj rimarkus la absurdecon de tia situacio kaj komencus kompreni la argumentojn de la esperantistoj.

La propono, kiel dirite, ne venos de la "grandlingvanoj". Ĉu iuj aliaj kuraĝos fari ĝin? Hungaroj elstaris per propono rilate al esperanto en la monda turista organizo. Kiu alia malgranda nacio iniciatos proponon pri "lingva egaligo", kiu forprenu la evidente maljustan privilegion al kelkaj parolantoj? Mi dubas, ke Svedio estos inter ili. Sed fakte: Svedio eĉ povus daŭrigi sian anglafavoran instrupolitikon post la akcepto de tia propono (sed malebligus al si mem, ke la angla iam fariĝu oficiala lingvo, se iu venus al tia ideo).

Ne, mi ne kredas, ke iam okazos decido pri parolo en alia ol sia propra lingvo, kiam temas pri la "grandaj" lingvoj, kun escepto de decido rilata al akcepto de esperanto kiel lingvo por internacia komunikado. Sed la kromvojo al esperanto per tia rimedo eble tamen estus tempoŝparo kompare al la nuna atendado, ke "la situacio maturiĝu".

Franko Luin

LA NOVA TESTAMENTO
i ny upplaga, inbundet
i vackert styvt grönt
band. Pris kr. 25,-

LA VIRO EN LA
MORTOTUKO
Priset nu sänkt till
kr. 20,-

SPRÅKET ÖVER
GRÄNSERNA
Lärobok, pris kr. 8,-

FÖRLAGET
GRÖNA STJÄRNAN
Landerigatan 7,
416 70 Göteborg
Tel. 031-19 37 90
Postgiro 8 84 51-0

Jansson k.a.: Svenska-esperantisk ordbok + supplement 576 + 210 p 100,—

Plena ilustrita vortaro 1303 p 426,—

Plena vortaro kun suplemento 511 + 63 p 68,—

Moberg, K.J.: Byggnadsteknisk ordlista 100 p 10,—

Nylén, Paul: Esperantisk-svensk ordbok 267 p 25,—

Vilborg, Ebbe: Lilla esperanto-ordboken 193 p 30,—

NOTO: La signo × post prezo indikas postdevalutan prezon.

OBS: × efter ett pris står för redan förhöjt pris p g a devalveringen.

- Sänd din beställning till EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 11138 Stockholm.
- Sätt in vad böckerna kostar på postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet, så slipper du fakturaavgift på 5,— kr.
- I priserna ingår moms och porto. Reservation för ändring av valutakurser, moms m.m.

Esperantoförlaget

DAGS ATT TÄNKA PÅ UEA

Det börjar bli dags att betala avgiften till UEA för 1983. Gör det i tid, så hjälper du både dig själv och UEA. Välj rätt avgift:

190 kr

och du blir MA, dvs medlem med både årsbok och tidningen esperanto

76 kr

och du blir MJ, dvs får bara UEAs årsbok (det är inte bara det!)

380 kr

utöver någon av de nämnda avgifterna och du blir stödjande medlem i UEA, dvs medlem i Societo Zamenhof. Svenskar, som har råd att betala, kan genom denna extra avgift göra en god insats för att hjälpa den internationella organisationen.

Inbetalning till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto. Förfrågningar hos Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09.



Västerbottens Folkblad 25/10 1982

En förutsättning för fred är att människor och nationer kan samtala med varann och förstå varann. Ett världsspråk skulle förbättra förutsättningarna. Det finns ett sådant språk. Esperanto.

ESPERANTO FÖR FRED

Misstroende och missförstånd har genom tiderna utlöst förödande våld mellan människor och nationer. När människorna inte förstår varann, inte kan tala med varann, växer misstänksamheten. De problem som kunnat lösas genom samtal och förhandlingar, får istället sin "lösning" genom mord och krig.

Ändå vill ingen människa krig. Alla bär innerst inne på tankar om hur freden skulle kunna förverkligas. Men hur ska dessa tankar kunna nå andra när vi inte talar samma språk, inte förstår varann?

Ett gemensamt världsspråk skulle radikalt förbättra förutsättningarna för umgänget mellan världens människor och nationer. Det skulle göra det möjligt för människor från skilda kulturer att tala med varann på lika villkor. U-ländernas delegater skulle slippa förhandla på den forna kolonialmaktens språk. Deltagarna i en förhandling skulle inte längre delas upp i överlägsna och underlägsna allt efter deras kunskaper i förhandlingsspråket.

● Ett världsspråk

Det finns ett sådant världsspråk. Det heter esperanto. Det talas och skrivs i praktiskt taget alla länder, men ännu saknas de politiska beslut som skulle kunna göra det till något annat än ett slags hobby för idealister världen runt.

Fördelen med ett världsspråk är att ingen har det som modersmål. Det är ett språk som alla ska kunna lära sig vid sidan av det egna modersmålet. Esperanto konstruerades för omkring 100 år sedan i just detta syfte. Det har bara 16

enkla regler (utan några undantag) och är lätt att lära även för äldre människor. Försök i flera länder visar dessutom att skolbarn lättare lär sig främmande språk om de först får lära sig esperanto.

Trångsynt nationalism och stormaktsanspråk har hittills hindrat esperantorörelsen från att få behövligt stöd. Stormakterna försöker göra sina egna språk till världsspråk, men har skändligen misslyckats.

● Kommunikationsåret

Att människor får möjlighet att mötas och samtala, är en förutsättning för fred. Därför måste kommunikationerna mellan länderna rejält förbättras. Därför har FN förklarat att 1983 ska vara det internationella kommunikationsåret. Det bör vi ägna åt diskussion om människans viktigaste kommunikationsmedel, språket.

Esperantorörelsen i Sverige är ännu ganska svag. Samhället lägger ned väldiga resurser på att vi ska kunna lära oss praktiskt taget vilket som helst av världens omkring 3 000 nationella språk. Men knappt ett öre på det enda internationella språket, esperanto.

Detta måste ändras. Fler skolbarn måste få chansen att lära sig "hoppets språk". Sverige bör i FN och andra internationella organisationer arbeta för esperantos och därmed fredens sak.

Ingemund Bengtsson är vår kanske mest kände esperantist. Det skulle tjäna fredens sak om han fick sällskap av fler politiker.

H Kn